

Heinrich Heine,  
**The Lorelei**  
*tradukita de L. W. Garnham*

I do not know what it signifies.  
 That I am so sorrowful?  
 A fable of old Times so terrifies,  
 Leaves my heart so thoughtful.

The air is cool and it darkens,  
 And calmly flows the Rhine;  
 The summit of the mountain hear-  
 kens  
 In evening sunshine line.

The most beautiful Maiden entran-  
 ces  
 Above wonderfully there,  
 Her beautiful golden attire glances,  
 She combs her golden hair.

With golden comb so lustrous,  
 And thereby a song sings,  
 It has a tone so wondrous,  
 That powerful melody rings.

The shipper in the little ship  
 It effects with woe sad might;  
 He does not see the rocky slip,  
 He only regards dreaded height.

I believe the turbulent waves  
 Swallow the last shipper and boat;  
 She with her singing craves  
 All to visit her magic moat.

...

Heinrich Heine,  
**Lorelej**  
*tradukita de Ludwig Lazarus Zamenhof*

Ne scias mi, kial subita  
 malgaj' en la koro naskiĝis;  
 el tempo jam enterigita  
 legendo al mi reviviĝis.

Jam malvarmetiĝas l' aero,  
 la Rejno mallaŭte babilas,  
 per oro de l'sun' en vespero  
 la supro de l' monto rebrilas.

Plej belan knabinon mi vi-  
 das:  
 en ora ornamo brilante,  
 sur supro de l' monto ŝi si-  
 das,  
 la harojn mistere kombante.

La oran kombilon ŝi movas  
 kaj kantas tra l' pura aero,  
 kaj forto mirinda sin trovas  
 en tiu ĉi kant' de l'vespero.

Ŝipet' iras sur la rivero,  
 Ŝipisto ektremis de l' kanto,  
 kaj blinda por ĉiu danĝero  
 rigardas li al la kantanto.

Ha, baldaŭ ŝipisto la bela  
 perdiĝis sub l' akvoturnado;  
 ĝin Lorelej' faris kruela,  
 per sia mirinda kantado.

...

Heinrich Heine,  
**Lorelay**  
*tradukita de Hans-Georg Kaiser*

Min kaptas malgaj' en la ko-  
 ro,  
 pro kio tia trist'?  
 Fabel' el antikva foro  
 ne lasas de mi kun persist'.

Aere fridetas, trunkvilas,  
 malhelas jam la Rejn'.  
 La monto surpinte brilas  
 vespere en rava scen'.

Tre ĉarma feino sidas,  
 jen supre por ador';  
 la ora ornamo ridas;  
 ŝi kombas harojn el or'.

Ŝi kombas per ora kombilo  
 kaj kantas kun pasi';  
 mirigas min la elbrilo  
 kaj forto de l' melodi'.

Ŝipisto ŝipeton gvidas,  
 lin kaptas ve' de ekzalt'.  
 Li ja la rifojn ne vidas',  
 li vidas nur supren sen halt'.

Mi kredas, ke ondoj tiras  
 la ŝipon funden de l' Rejn';  
 kaj tio de l' kant' eliras  
 de Lorelaj-siren'.

...

*Traduko de la Germana poemo “Die Lorelei” de HEINRICH HEINE (\*1797-12-13 – †1856-02-17) en la Anglan de L. W. Garnham.*

Arg-2-14 (2003-10-11 23:04:57)

*L. W. Garnham, Bachelor of Arts, LEGENDS OF THE RHINE; mentioned in: A Tramp Abroad. Vol 1-2. Leibzig: Tauchnitz, 1880 Band I, Mark Twain 1880*

*Traduko de la Germana poemo “Die Lorelei” de HEINRICH HEINE (\*1797-12-13 – †1856-02-17) en Esperanton de LUDWIG LAZARUS ZAMENHOF (Ludoviko Lazaro Zamenhof, \*1859-12-15 – †1917-04-14).*

Arg-2-565 (2009-10-30 16:15:09)

*Tiun ĉi tradukversion mi prenis el retejo <http://www.esperanto.mv.ru/Kolekto/Lorelej.html>.*

*Traduko de la Germana poemo “Die Lorelei” de HEINRICH HEINE (\*1797-12-13 – †1856-02-17) en Esperanton de HANS-GEORG KAISER (Cezar, \*1954-05-21).*

Arg-2-564 (2005-02-03 19:18:09)